

La Pariza Grupo invitas vin partopreni en la

## Zamenhofa Tago

la dimanĉon 16an de decembro  
en la sidejo de SAT-Amikaro

Le Groupe Parisien vous invite à participer à la

## Journée Zamenhof

le dimanche 16 décembre  
au siège de SAT-Amikaro

134, bd Vincent Auriol, Paris 13°. Metrostacioj : Nationale (50 m), Campo-Formio, Place d'Italie. Buso n° 27.

### PROGRAMO / PROGRAMME

■ **10:00 precize** — Ĝenerala Kunveno de la “Pariza Grupo” (*10 heures précises : Assemblée Générale*)

**Tagordo** — *Ordre du jour*

Raporto pri la aktivaĵoj dum 2007

Kasraporto

Renovigo de la Komitato por la jaro 2008

Kongreso de SAT-Amikaro en **Antony** (Hauts-de-Seine - 92)

Esperanto-Migranto/Radio Esperanto/Junulfako/Najbaraj grupoj

Diversaĵoj

■ **12:30** — Proksimaj manĝeblaĵoj : Pluraj restoracioj ĉe Placo de Italio kaj avenuo Gobelins

■ **14:00-17:00** — Malferma posttagmezo en la sidejo de SAT-Amikaro.

Profesoro Robert Molimard parolos pri la problemoj de tabakismo, de dependeco kaj liberiĝo. Li dediĉos siajn librojn “*La Fume-Smoking*”, ties Esperanto-tradukon (“*La Fumado*”), kiun li mem faris, kaj ankaŭ “*Petit manuel de défume*” (eld. Sides).

*Après-midi “Portes ouvertes” au siège de SAT-Amikaro :*

*Le professeur Robert Molimard parlera des problèmes de tabagisme, de dépendance et de libération. Il dédicacera ses livres “La Fume-Smoking”, sa traduction en espéranto (“La Fumado”), qu’il a faite lui-même, et “Petit manuel de défume” (éd. Sides).*

## Tutmonda Festo de la Esperanto-Libro. Malfermata al la publiko *Fête Mondiale du Livre d’espéranto. Ouverte au public*

**Dediĉo de libroj fare de / Dédicace de livres par : Henri MASSON : L’homme qui a défié Babel & La homo kiu defuis Babelon** (L’Harmattan), publikigita en la franca kaj ankaŭ en tradukoj Esperanta, hispana, korea, litova kaj ĉeĥa. *Publié en français, traduit et publié en espéranto, espagnol, coréen, lituanien et tchèque.*



### La plus grande exposition de livres et de dictionnaires d’espéranto de la région parisienne

Découvrez à cette occasion, au siège de SAT-Amikaro, un grand choix de livres, de documents et articles divers (cassettes, CD, insignes, autocollants, entiers philatéliques, cartes postales, etc.) pour se documenter sur l’espéranto, l’apprendre, le faire découvrir, se perfectionner, se distraire, se cultiver, l’appliquer.

C’est l’occasion exceptionnelle pour se renseigner, avoir des contacts, pour s’organiser afin d’améliorer nos services.

➔ Venu ankaŭ kun geamikoj kaj konatoj / Venez aussi avec des amis ou connaissances. ➔

# Cours d'espéranto

Au siège de SAT-Amikaro, 132-134, boulevard Vincent Auriol, 75013 PARIS

Tél. 01 44 24 50 48 — Fax 01 44 24 50 02 — <www.esperanto-sat.info> — <sat-amikaro@wanadoo.fr>

<b>1er degré</b>	Le lundi à 18 h, avec <b>Georges MEILHAC</b> et le mercredi à 14 h 30, avec <b>Hélène BONJOUR</b>
<b>2ème degré</b>	Le mercredi à 16 h, avec <b>Thérèse PINET</b> et le jeudi à 16 h, avec <b>Elisabeth BARBAY</b>
<b>3ème degré</b>	le vendredi à 18 h, avec <b>Vinko MARKOV</b>
<b>Babilrondo</b>	Le premier mercredi du mois à 17 h 30, avec <b>Thérèse PINET</b> .
<b>À la demande</b>	Après accord avec <b>Andrée HOULGATTE</b> : tél. 01 45 81 38 74.

Cours par correspondance de premier, second et troisième degré. Inscription à tout moment de l'année auprès de **Marcel REDON**, 52 Grande Rue, 57365 Flévy. Tél. : 03 87 73 95 57

## PARIZA GRUPO de SAT-Amikaro — Aktivaĵoj dum la jaro 2007

**INFORMADO** — Por informi la publikon pri Esperanto kaj niaj kursoj, ni aperigis artikolojn en 6 lokaj aŭ urbaj gazetoj; ni afiŝis en la Urbodomo de la 13a arondismento, en la domo de la asocioj, sur 10 oficialaj urbaj paneloj, sur multaj asociaj paneloj, en universitataj, altlernejoj, bibliotekoj, ktp. Plie, ni eldonis kiel kutime 1000-ekzempleran kursfolion sendita al la legantoj de **La SAGO** kaj al personoj kiuj petis informojn ĉu en la sidejo, ĉu en la diversaj Esperanto-standoj. Ni ankaŭ anoncis niajn kursojn sur la TTT-paĝoj de la Urbodomo de la 13a dank' al **Alain Coulon**. Prezentado de Esperanto okazis la sabaton 9an de septembro en la sidejo.

**KURSOJ** — Funkcias du unuagradaĵoj, du perfektigaj kaj unu triagrada en la sidejo dank' al **Hélène Bonjour**, **Elisabeth Barbay**, **Térèse Pinet**, **Georges Meilhac**, **Vinko Markov**.

**BABILRONDO** — La unuan merkredon de ĉiu monato, **Thérèse Pinet** animas konversacian rondon pri la temoj Historio kaj Literaturo de Esperanto.

**ESPERANTO-BUDOJ** — Ni ĉiam kaptas la okazon kiam ni povas instali senpagan Esperanto-standon dum diversaj manifestacioj kiel la Festo de la Asocioj en la Urbodomo de la 20a arondismento, placo Gambetta, la 17an kaj 18an de marto 2007; "Rentrée 13" en la Urbodomo de la 13a, placo de Italio la 8an de septembro 2007; "Espace Forum" sur la bazaro Blanqui apud la placo de Italio

la dimanĉon 30an de septembro 2007 kaj en diversaj ĉirkaŭaj urboj : **Bondy**, **Choisy-le-Roi**, **Orly**, **La Courneuve**, eĉ en **Merlieux** en la departemento Aisne. Ni dankas niajn geamikojn **Muguette** kaj **André Sadier**, **Dominique Simeone**, **Guy Cavalier**, kaj aliajn kiuj deĵoris ĉe tiuj budoj.

**ZAMENHOF-TAGO** — Kiel ĉiujare, nia grupo organizas en la sidejo de SAT-Amikaro la tradician Zamenhof-Feston kun prelego kaj subskriboj de aŭtoroj.

**DEĴORADO EN LA SIDEJO de SAT-AMIKARO** estas efektiva ĉiun mardon de la 9a ĝis la 17a horo dank' al sindonemo de **Juliette Boyer**, **Juliette Ternant**, **Lilio Grandière**, **Elisabeth Barbay**, **Jacques Fichou**, **François-Xavier Billing** kaj kelkaj aliaj kiuj okaze helpas.

**ALIAJ AKTIVAĴOJ** : La Pariza Grupo kunvenas la 2an sabaton de ĉiu monato. Proponu vin por animi aliajn aktivaĵojn, ekzemple, regulan partoprenon en **Radio Esperanto**, ekspozicioj, prelegoj pri Esperanto en la Junuldomoj, afiŝado, plia deĵorado

do en la sidejo, aranĝo de la montrofenestro, aŭ eĉ purigado de la idejo, ktp.

**RESUME** : Ni atendas vian kunlaboradon. Dankon !

La Sekretario de la Pariza Grupo : **André SADIÉ**.

### *Kio okazis/los parizregione, Francie kaj tutmonde rilate al Esperanto ?*

Que s'est-il passé, que se passe-t-il, que se passera-t-il en région parisienne, en France et dans le monde à propos de l'espéranto ?

## Radio Esperanto

**89,4 MHz, 17:30-19:00**

Ĉiuvendrede — Chaque vendredi

[http://rl.federation-anarchiste.org/rubrique.php3?id\\_rubrique=65](http://rl.federation-anarchiste.org/rubrique.php3?id_rubrique=65)

## 63a Kongreso de SAT-Amikaro en Antony

de la 22a ĝis la 25a de marto 2008

Ĝi havos lokon en la universitata rezidejo Jean Zay, 55 avenue du Général de Gaulle, en Antony. La Organiza Kongres-Komitato (OKK) jam klopodas por ke ĝi estu malfermita al ĉies ideoj por la bono de nia asocio, kaj eventoplena por ĝui memorindajn spektaklojn, vizitojn ktp. Ne hezitu proponi vin por helpi la OKKon. Informoj aperos en "**La SAGO**", ties franclingva informsuplemento "**Service de Presse**", sur la SAT-Amikara retejo [www.esperanto-sat.info](http://www.esperanto-sat.info), kaj en la informlisto de SAT-Amikaro al kiu ĉiu povas enskribiĝi laŭ simpla peto. Ni strebos disponigi al vi pli precizajn informojn okaze de la Zamenhofa Tago.

## 81a Kongreso de SAT en Kazanlak, Bulgario

en la fama "Valo de la rozoj" (l'occasion d'être au parfum ! ;-), de la 9a ĝis la 16a de aŭgusto 2008

Kongreso de SAT jam okazis en tiu urbo. Tiu ĉi okazos 15 jarojn poste. Estos certe interese vidi kio okazis dum tiu periodo sur la socia tereno, havi la opinion de laboristoj kaj de simplaj civitanoj. La restadkondiĉoj estas moderprezaj. Informoj aperas en "**Sennaciulo**", la organo de SAT, kaj sur la retpaĝo <http://satesperanto.org/KONGRESO-2008.html> kun bela bildprezentado.

La Parizano, oct.-nov. 2007. **NE FORGESU** pagi vian kotizon 2008 kaj respondi la referendumo i.a. por proponi kunlaboron kaj helpon.

***L'espéranto progresse — Progressez avec l'espéranto !***